

ESPERANTA FINNLANDO

1960

N:o 7

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj
Abonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

Opintokerhoja perustamaan

Esperanton opiskeleminen paikkakunnalla, missä ei ole mahdollista saada opetusta työväen- tai kansalaisopistoon, käy parhaiten kerhon muodossa. Tällaiselle itsenäiselle kerholle voidaan saada valtionapua opintokirjoina. Apu on tosin toistaiseksi vaatimaton, 1000 mk kerhoa kohti — Mutta onhan sekin enemmän kuin ei mitään.

Kerho on perustettava jonkin järjestön puitteissa. Tällaisena toimii mm. Suomen Esperantoliitto.

Opintokerhon ei tarvitse olla rekisteröity yhdistys, mutta sillä pitää olla Opintotoiminnan Keskusliiton hyväksymät säännöt. Mallisäännöt saadaan S. Esperantoliitolta. Säännöt ovat hyvin yksinkertaiset. Muuta virkailijaa, paitsi opinto-ohjaajaa, ei tarvitse valita, ja muodollisia kokouksia tarvitsee pitää vain kaksi, toimikauden alkaessa ja päättyessä. Opinto-ohjaajaksi hyväksytään kerhon jäsen, joka uhraa asialle harrastuksensa ja taitonsa.

Suomen Esperantoliiton jäsenmaksu on 100 mk kerhon jäsentä kohti. Kerholle lähetetään eri maksutta Esperanto Finnlando sekä mahdolli-

suuksien mukaan tiedoitusaineistoa kerhon käytettäväksi.

Valtionavun saannin ehdot ovat edelleen:

Kerhon on pidettävä vähintään 12 opintokokousta syyskuun 1. ja toukokuun 31 päivän välillä. Opinnoiksi luetaan alkeiskoulu, kirjallisuuden lukeminen ja esperantokielineen keskustelu — toiminta on siis mahdollisimman vapaata.

Kerhossa pitää olla vähintään 5 kuusitoista vuotta täyttäneitä jäsentä.

Liittymisilmoitus ja valtionapuanomus on lähetettävä S. Esperantoliitolle viimeistään marraskuun 15 päivänä Liitolta saatavaa lomaketta käyttäen. Toimintakertomus on lähetettävä toukokuun 15 päivään mennessä. Tätä varten on opintokokouksissa pidettävä päiväkirjaa läsnäolosta.

Kerholle lähetetään pyynnöstä opintosuunnitelma.

Erikoisesti suositlemme tilaamaan Valtatien kielitaitoon-nimistä oppikirjaa vastaavan **äänirainan**, varsinkin jos paikkakunnalla ei ole perehtynyttä esperantontaitajaa,

NIA VOJAĜO AL LENINGRAD

KAJ MOSKVA

la 2. VII — 8. VII 1960.

Hezitante longe inter la intencoj vojaĝi aŭ al Bruselo aŭ al Tallinn, ni fine elektis la vojaĝon tra Leningrad al Moskva, ĉar tiu vojaĝo, aranĝota de Sovetia Intourist aspektis la plej malmulte laciga pro tio, ke ĝi plejparte estis farota aeroplane.

La vojaĝo de 30-persona grupo komen- ciĝis en Helsinko la 2. VII ja la 10,15 horo per la trajno, kiu enhavis nur rusajn vagonojn. — Ĉe la limo la rusaj doganistoj kaj la kontrolantoj de pasportoj estis tre ĝentilaj, kaj unu el ili eĉ parolis finne.

En nia antaŭa hejmurbo Viipuri la trajno haltis 40 minutojn, kaj ni havis okazon promeni sur la placo antaŭ la stacidomo. — La regiono inter la nova kaj la malnova limoj aspektis plejparte neloĝata, ĉar sur la antaŭe kulturitaj kampoj kreskis arboj kaj arbustoj. — Nur malgrandajn terpomkulturejojn ni vidis ie kaj tie.

La karavano havis dum la tuta vojaĝo gvidanton, finne kaj ruse parolantan fraŭlinon loĝantan en Helsinko. Krome en Leningrad kaj Moskva estis apartaj gvidantoj, ankaŭ fraŭlinoj, kiuj kontentige parolis finne. Ĉiuj tri gvidantinoj estis bone instruitaj por sia tasko.

En Leningrad, kiun ni atingis laŭ la moskva tempo 21.35, nin atendis kun granda florbukedo kvin esperantistoj, kiuj pere de s:ano Majzel estis ricevintaj informon pri nia alveno. Kvar el ili akompanis nin en la aŭtobuso de nia karavano al la hotelo Jujnaja, kie ni loĝis. Sinjorinoj Gorbunova kaj Cvetkova venis ankoraŭ en la sekvinta tago, kaj sinjorino Cvetkova akompanis nin dum la ekskurso al Peterhov. — Nia renkontiĝo kun la esperantistoj vekis atenton de aliaj kun- vojaĝantoj, kaj estis bona propagando por esperanto.

La Vintra Palaco (iama loĝejo de imperiestroj) kaj Ermitaŝo, kiujn ni vizitis, formas grandegan komplekson, kaj en la centoj de liaj salonoj dekmiloj da vizi- tantoj svarmis rigardante la grandegan abundon de artaj kaj etnografiaj objektoj.

En hotelo Juiraja nia ĉambro estis bona kaj la manĝaĵoj en ĝia manĝejo bonaj kaj abundaj. — La vidindaĵoj de la urbo estas tiel multaj, ke ni povis dum du tagoj vidi nur parteton el ili. La stacioj de la subtera fervojo Metro estas luksaj, kaj Peterhov, la iama somera resta- dejo de imperiestroj, enhavanta multajn palacojn kaj pli ol 100 fontanojn kun orumitaj skulptaĵoj, prezentas grandegan luksan. Post la milita detruo plejparto estas rekonstruita.

En la urbo kreskis novaj vastaj urbo- partoj al la loko de postmilitaj ruinoj. — La strata vivo kaj trafiko ne aspektis en Leningrad tiel vigla kiel en okcidentaj grandurboj, kaj la montrofenestroj de vendejoj kaj magazenoj ne montris abun- don de diversaj varoj.

Post dutaga restado en Leningrad nia karavano flugis per rusa aeroplano, havanta lokon por 100 pasaĝeroj, en 75 minutoj al Moskva. La flugo okazis plejparte en krepusko kaj mallumo, kaj tial ne estis eble admiri la vidajojn. Veturo al la hotelo daŭris preskaŭ la saman tempon kiel la flugo el Leningrad. Ni loĝis en hotelo Balĉug kaj manĝis en restoracio National. Ankaŭ en Moskva la hotela ĉambro kaj la manĝaĵoj estis bonaj.

Nia grupo veturadis zigzage en la reto de Metro (havanta longecon de 90 km) dum unu horo. La trajnoj alvenadis unu post la alia ĉiam post du minutoj. — La strata vivo kaj trafiko estis pli vigla ol en

koska tämän avulla oppii parhaiten ääntämään oikein.

S. Esperantoliittoon liittyneille kerhoille tarjoamme erikoisen edun: Äänirainan käyttö tietysti edellyttää kuvanheittimen ja magnetofonin käyttöä. Toivottavasti jollakulla kerhon jäsenellä on nämä kojeet. (Pelkkä ääntämisohje on myös saatavana, ilman kuvanheitintä, magnetofonis- sa käytettäväksi). Jos voitte vaika- kapa tilapäisesti käyttää kahta mag- netofonia yhtäkaaa, niin voitte ko- pioida kumman tahansa ääninauhan

itsellenne. Tätä varten saatte ääni- nauhan lainaksi suorittamalla vain edestakaiset postimaksut.

Muut hinnat ovat:

Tähän kuuluva ääninauha,
Pelkkä ääntämisohje

(n. 15 min.) 400 mk.

Kuvaraina, 13 lukua Valtatietä,
240 kuvaa 1200 mk.

Tähän kuuluva ääninauha,
n. 2 tuntia 3300 mk.

Lähetyskulut lisäksi.

Suomen Esperantoliitto r.y.

M a t i n k y l ä

Leningrad, kaj la homoj aspektis pli bone vestitaj.

Vicoj de »pilgrimantoj» serpentumis kilometre sur la stratoj kaj sur Ruĝa Placo moviĝante malrapide al la maŭzoleo de Lenin kaj Stalin. — Ĉar turistaj grupoj ne havas tempon dum multaj horoj staradi en vico, la policistoj donas al ili lokon en la vico proksime de la maŭzoleo. Tiel ankaŭ nia grupo restis en la vico malpli ol unu horon. — Ĉe la pordo de la maŭzoleo du gardistoj staris kiel statuoj kun preskaŭ fermitaj okuloj, kaj en la krepuska irejo de la maŭzoleo staris gardistoj en ĉiu angulo kaj same ĉe kvar anguloj de la malferma sarkofago, en kiu la du mortintoj kuŝis palaj kaj lumigitaj per lumjetiloj. La maŭzoleo estas konstruita ĉe la muro de Kreml sur Ruĝa Placo.

En Kreml la historiaj vidindaĵoj estas multaj. Ni vizitis plurajn preĝejojn, kiuj staras preskaŭ unu apud la alia, kaj la historian muzeon («Arsenalon»), kiu enhavas multege da ekipaĵoj kaj valoraĵoj de caroj el multaj jarcentoj. Oro kaj arĝento abundas tie. Apud 80 metrojn alta sonorilturo kuŝas rompita sonorilego, kies pezo estas 200 tunoj. Dum levo supren en la turo ĝi falis kaj rompiĝis.

Ne eblas eĉ mencii la plasojn, statuojn, palacojn kaj aliajn vidindaĵojn en Moskva, ĉar ilia nombro estas nekalkulebla. Nian atenton vekis multaj turoformaj palacoj, kiuj multe similas al Kulturpalaco en Varsovio (kiu palaco estas donaco de Sovetio).

En la grandaj varomagazenoj estas aĉeteblaj diversaj varoj, sed la sortimento ne estas tiel varia kiel en okcidentaj landoj. La irejoj de la magazenoj estis plenplenaj de homoj. — Ankaŭ en Moskva estas konstruitaj vastaj novaj urbopartoj havantaj parkojn kaj placojn.

En Moskva ni ne sukcesis renkonti esperantistojn, kvankam ni estis informintaj pri nia vizito per du leteroj kaj en la urbo ni vane penadis telefone akiri kontakton al la delegitoj de UEA.

La vojaĝo hejmen okazis per finna aeroplano rekte al Helsinki. Ĉar la 3-hora flugo okazis en sunbrilo super la nuboj en la alteco de 5400 metroj, ĝi estis interesa travivaĵo. La nuba pejzaĝo similis al laga regiono havanta insulojn, sur kiuj kreskis blankaj foliarboj forte lumigitaj. La dimensio de proksimaj nuboj aspektis vertikala, sed la malproksimaj nuboj aspektis simile kiel vidite de sur la tero. — Nur ie kaj tie vidiĝis tero tra la truoj en la nubaro. La aeroplano ŝajnis kuŝi senmova, ĉar la tero malsupre apenaŭ moviĝis.

Nia vojaĝo estis ĉiurilate sukcesa. Nur la promenadoj en la artgalerioj en varmo estis lacigaj. Al la vizitataj lokoj oni

ĉiam veturigis nin per la aŭtobuso de Intourist.

Nur du konsilojn mi volus doni al la aranĝontoj de tiaj ekskursoj. En la unua konvena okazo, ekzemple dum la unua komuna manĝo, oni devus prezenti la kunvojaĝantojn inter si. Tio okazus facile tiel, ke oni laŭtlege malrapide la nomojn, kaj ĉiu ekstaru aŭdante sian nomon. — La dua konsilo estas tio, ke oni donu al la grupanoj programon de la vojaĝo (almenaŭ proksimuman, se ne eblas doni precizan) skribe se eble jam antaŭ la vojaĝo. Por esperantistoj tio estus speciale grave, ĉar tiam ili havus okazon doni al la lokaj esperantistoj informon pri la vizito kaj tio ebligus aranĝon de renkontiĝo.

Sed plej agrable estus, se oni sukcesus formi la tutan grupon el esperantistoj kaj povus adapti la programon tiel, ke oni povus ĉeesti la kunvenon de loka esperanto-grupo.

Nia vojaĝo estis tute sukcesa, kaj ni havas kaŭzon danki al niaj tri gvidantinoj kaj aparte al la gesamideanoj Majzel, Gorbunova kaj Cvetkova.

H s K.

Yksi maailma, yksi kieli, yksi raha

Muutamia vuosia maailmansodan jälkeen kirjoitti otsikossa mainitut sanat kilpeensä **Universala Ligo**, kansainvälinen järjestö, joka ajaa federalismin asiaa ja jonka ainoana virallisena kielenä on esperanto. Ohjelmansa mukaisesti järjestö otti käyttäntöön kansainvälisen raha-yksikön, jolle se antoi nimen »stelo». Sen arvo on neljäsosa Hollannin guldenia, ja eri maita varten on sille vahvistettu määrätyt kurssit. Monet eri maissa sijaitsevat esperantistien kustannusliikkeet hinnoittelevat kirjansa ja muut tuotteensa »ste-loissa», ja enemmän kuin kymmenen vuoden ajan on tämä systeemi tuottanut helpotusta esperantojärjestöjen kaupallisessa toiminnassa.

Tähän asti on »stelo» ollut olemassa vain kuponkeina, mutta kesäkuun 28 p. 1960 valmistuivat ensimmäiset metalliset rahat (10:n, 5:n ja 1:n stelon rahoina) Hollannin valtion rahapajassa. Tämä raha on liikkeessä Hollannin Valtionpankin suostumuksella ja vastuulla..

Kaksoiskaupunkeja

eli kaupunki-kaksosia on viime vuosina syntynyt useissa maissa vuoden 1951 jälkeen lähes 300. Ne eivät ole lähekkäin sijaitsevia ja sen takia yhteen kasvaneita kaupunkeja, vaan eri maissa sijaitsevia kaupunkeja, jotka ovat julistautuneet kaksosiksi ja päättäneet ryhtyä harjoittamaan monipuolista kulttuurillista yhteistoimintaa. — Kun kielen erilaisuus tuottaa vaikeutta tällaiselle toiminnalle, ovat italialainen kaupunki **Massa** ja saksalainen **Bad Kisslingen** ryhtyneet käyttämään yksinomaan esperantoa yhteyden välittäjänä. Kummankin kaupungin johtohenkilöt ovat opetelleet esperantoa, jota käytetään kirjeenvaihdossa ja yhteisissä juhlatilaisuuksissa. Kaksoistumisen pääjuhlat pidettiin 16—23 p. huhtikuuta 1960 Massassa ja osal-

listui niihin noin 1000 henkilöä. Osanottajille jaettiin tapauksen muistoksi lyödyt mitalit kultaan, hopeaan tai pronssiin valettuna. Siitä lähtien on vilkas vuorovaikutus jatkunut ja jatkuu molemminpuolisten vierailujen, retkeilyjen ja juhlien muodossa. Myös yleisölle on molemmissa kaupungeissa järjestetty esperantokursseja. Suuri italialainen sanomalehti *La Nazione* on säännöllisesti julkaissut raportteja tästä erikoisesta kaksoiselämän toteuttamisesta.

Myöskin italialainen kaupunki **Mirandola** ja jugoslavialainen **Novi Sad** sekä ranskalainen *Boulogne-sur-Mer* ja italialainen **Bologna** ovat kaksoiskaupunkeina ryhtyneet käyttämään esperantoa yhteiskielenään.

Pri UEA kaj 46a Universala Kongreso

Ni nun celebros kaj ankoraŭ celebros la 100-jaran jubileon de la naskiĝo de dro L. L. Zamenhof. Mi esperas, ke tio al ni ĉiuj montris, kiel grave kaj atinginde estas, ke lia genia kreaĵo en la proksima tempo venkos la ankoraŭ tre fortajn antaŭjuĝojn kaj fariĝos komuna posedaĵo de la tuta homaro. Sed ŝajnas ke ne eĉ ĉiuj samideanoj ankoraŭ tutplene konscias, ke ni ĉiuj unuavice apogu la Universalan Esperanto-Asocion, kiu estas la sola organizaĵo kiu antaŭenigas nian aferon en la tuta mondo kaj ankaŭ en plej altaj instancoj.

El la lastjaraj membroj ankoraŭ ĉ. 30 ĝis nun ne pagis sian jarkotizon por 1960. Mi atendas ke tiuj senprokraste tiun faros. Kaj sur ĉies koron mi volus meti la proponon, ke por 1961 ĉiu havigu al UEA unu novan membron. Por tiuj kiuj multajn membojn havigos, mi promesas valorajn libropremiojn.

La membrokotizoj estas por 1961 iom plialtigataj: Membro kun jarlibro (MJ) 690 mk, Membro-Abonanto (MA) 1380 mk, Membro-

Subtenanto 2070 mk. Gejunuloj malpli ol 21-jaraj pagos pro MJ kaj MA la duonon. Ĉiu kiu pagos antaŭ la fino de la jaro 1960 povas depreni el la supraj sumoj respektive 30. — 60. — aŭ 90. — Dumviva membreco kostas 27.600.—, sed pagite antaŭ la jarfino nur 24.000.—

La 46a Universala Kongreso okazos en Harrogate en la norda Anglujo. Komencu jam nun ŝparadon de la mono por ke vi kaŭblos vojaĝi en la somero tien. Mi aranĝos la karavanon. La kongrestempo 5—12 aŭgusto; antaŭ tio antaŭkongreso en Londono kaj eventuale postkongreso en Skotlando. La vojaĝkostoj proksimume 35.000 mk kaj por restado 20.000 — 30.000 mk. — Petu de mi aliĝilon: la kongresa kotizo estas 3.300 mk ĝis la jarfino, poste pli, la edz(in)o pagas la duonon; la gejunuloj 1.300 mk. — Mi akceptos nur UEA-membrojn.

Joel Vilkki

SOMERO

Tel: 45091.

Pĝk: Tu 60 253.

ESPERANTISTA MARISTO

Oni kelkfoje havas okazon renkonti maristojn, kiuj estas esperantistoj. Ni legis en la gazeto »Merimiehen ystävä» historieton, en kiu samideano Arnold Horsmala rakontis pri sia lastaŭtuna vojaĝo kiel ŝipano. Tia ĉi okazo estis tiel eksterordinara, ke ne temas pri iu juna maristo, ĉar sro Horsmala ja estas jam viro de matura aĝo. Li fakte estas eksmaristo kaj poste li funkciis kiel nokto-gardisto en la enhavenaj ŝipoj, — lasi tute la ŝipojn li ne povis, ĉar tiuj estas al li jam karegaj. Sro Horsmala nur sentis fortan sopiron al la maro, ree unufoje li volis ekvojaĝi kiel ŝipano, por persone viziti siajn esperantistajn leterkontaktojn en suda Ameriko. Lastan oktobron li »superparolis» ŝipestaron de finna m/s Aurora, kaj ricevis — en la aĝo de 62 jaroj — postenon de kajutbubo en nomata ŝipo. La 6an oktobro la ŝipo almariĝis, la steveno montris okcidenten, suden. Al samideano Horsmala estis la vojaĝo grandvalora: fine li povas renkonti siajn sud-amerikajn esperantoamikojn.

En tri tagoj atingis la ŝipo la buŝon de Kiel'a kanalo ĉe Holtenau. Reproviziumite la ŝipo daŭrigis al Brunsbüttel kaj ek al la Norda Maro. Post unu semajno de tiu, do 16. 10., estis Las Palmas, Kanariaj Insuloj, jam atingita. Tie la ŝipo nur plenigis oletankojn kaj ree estis sur la ondoj, la steveno nun montrante klare al Sudameriko. La ĉarpentisto preparis surŝipe naĝbasenon, kie estis bone flosadi en varma — +23°-akvo. Ne eĉ unu ŝarkon la ŝipanoj povis vidi, sed sro Horsmala rememoris okazon el siaj pli junaj jaroj, kiam li foje ĉe Galveston volis naĝi. Li demandis, ĉu eble estas ŝarkoj ĉirkaŭe, kaj la respondo estis, ke ne. Sekvantan fojon, kiam li vizitis la samar lokon, la akvo simple bolis je ŝarkoj. Sro Horsmala diras, ke li frostotremis.

La vetero dum la vojaĝo estis belega, kaj la 25an de oktobro sro Horsmala vidis la unuan albatron. Estas tre bela kaj granda birdo, kun tre longaj flugiloj kaj bonega flugokapablo. Laŭ onidiroj albatroj estas animoj de dronintaj maristoj. Sekvantan tagon la Brazilia bordstrio jam estis videbla, iom poste oni povis vidi ankaŭ la sukerkonuson kaj gigantan Kristo-skulptaĵon. En la haveno sro Horsmala jam renkontis tri semideanojn, sed la interparola momento restis tre mallonga, ĉar Aurora tuj kontinuus al Santos. Post kelkaj tagoj ili haltis ĉe Montevideo, kie sro Horsmala ree havis okazon interparoli kun kelkaj esperantistoj. Je lia granda surprizo unu el ili estis lia koresponda konato. Dum la unua vespero en Montevideo faris nia rakontanto prelegon pri Finnlando, kaj duan vesperon li kozerie babilis pri nia sauna.

En la ŝipo Aurora vizitis ĉ. 20-persona grupo de esperantistoj, al kiu sro Horsmala laŭeble klarigis ĉion eblan. La 8an de novembro la ŝipo denove enhaveniĝis, nun en Buenos Aires, tie samideano Horsmala vizitis la finnan maristan preĝejon, kies pastro Pohjanpirkka helpis al nia rakontanto kontakti esperantistojn. Antaŭ ol la ŝipo ree estis survoje, ĉifoje laŭ la rivero La Plata al Rosario, faris sro Horsmala prelegon ĉe esperantista klubo. En Rosario lin jam atendis en la haveno du esperantistoj, studentaj fratoj. Ree sro Horsmala ĉirkaŭrigardis la urbon kaj faris poste sian prelegon. Li ankaŭ partoprenis Asado-festeton kaj estis intervjuata en la radio. Dum la returna vojo li restis dum la adventa festo en Buenos Aires, en tiea finna marista preĝejo. Estis memorokupa okazo. Sro Horsmala sentis sin dankema al la Finna Marista Misio, pri la oazoj kiujn ĝi starigis ĉie por la finnaj ŝipanoj. Pastro Pohjanpirkka estis speciale helpema persono, kiu nian rakontanton multe helpis.

La 2an de decembro komencis vere la returna vojo. Survoje sro Horsmala malsaniĝis, kaptis pneŭmonion, kaj ree en variaj loko la Finna Marista Misio al li multe helpis.

Kion ni diru pri la supre priskribita? Nur, ke sro Horsmala ŝajnas esti vera ŝtalavo, laŭ moderna termino, kaj li certe aginte tiel faris belan propagandon kaj al esperanto kaj al nia Finnlando.

Arvikolo

Esperanto utilis al neesperantistoj

En Akeno (Aachen) dum la Postkongresa Eksamuro okazis jeno:

Iom malfrue alveninta aŭtobuso kun francaj turistoj el Limoges maltrafis delegiton de la urba turisma oficejo. Neniu el ili komprenis la germanan lingvon. Post kelkaj vanaj klopodoj ili sin turnis al belga samideano, kiu staris antaŭ la stacidomo dum la akcepto de la postkongresanoj. Okazis poste ia miraklo: La neesperantistoj francaj, sen la oficiala germana gvidisto, povis tamen viziti la urbon... dank' al Esperanto. Ilia aŭtobuso simple veturis post la du aŭtobusoj kun la kongresanoj, ĵus alvenintaj vagonare el Lieĝo. En la francan aŭtobuson eniris du samideanoj: Laufen el Akeno kaj D-ro Denoël el Lieĝo. Per rapida traduko el germana lingvo en Esperanton kaj poste en francan, la necesaj klarigoj estis donataj al la francaj turistoj, kiuj mirigite povis admiri la belecon de la fremda urbo. Ili daŭre dankis niajn samideanojn, kaj pli ol unu fojon ili diris: »Feliĉe, ke ni renkontis vin!» Al kio estis responde: »Feliĉe, ke ekzistas Esperanto.»

El »HEROLDO»

Obstine antaŭen!

Esperanta literaturo

Ole Nederland: TOM kaj TINA, Internacia Esperanto-lernolibro por infanoj. Eldonis Dansk Esperanto-forlag, Åbyhøj, Danlando. Prezo 5,50 DKr aŭ egalvaloro. Formato 15,5x23 cm.

Sro Nederland instruis kun granda sukceso infanojn en sia Odense'a lernejo kaj ankaŭ dum la feriaj esperantokursoj en Vejle. La eldonistoj volis publikigi la instrumaterialon de sro Nederland en libroformo, ĉar la instruado en la menciitaj lokoj estis vere sukcesplena. Nun la libro estas preta kaj havebla, kaj tra leginte ĝin oni volonte kredas, ke infanoj vere lernis esperanton instruitan laŭ la linioj troveblaj en la verko.

Mi ne scias por kiel aĝaj infanoj la libro estas deducita, sed mi kredas, ke la aĝo estas tre signifa faktoro en la instruado. Almenaŭ laŭ la evoluritmo de niaj finnaj infanoj, ŝajnas al mi, ke la plej konvena aĝo estas 9 aŭ 10 jaroj. Por pli junaj la streĉa komploto, kiu formigas la trunkon de la verko, restus eble iom malfacile digestebla, por pli aĝaj ĝi eble estas tro primitiva kaj infaneca. Mia persona opinio estas tia, ke oni unue trastudu tiun ĉi libron, kaj post kelkaj jaroj (du jaroj plej konvene) oni tute restartu la esperantajn studojn per iu alia libro, kiu donos pli larĝan fundamenton, ĉar TOM kaj TINA estas bazita sur tre malgranda fundo. Tiu ĉi tute ne estas mallaŭdo, ĉar estas laŭcele komenci per lernolibro, kiu ne estas tro malfacila kaj ampleksa, kaj tiel fortimiga. TOM kaj TINA donas la elementojn en tre amuza formo sen troa altrudo, tiel donante konvenan starton ankaŭ por posta amo kaj entuziasmo al nia lingvo.

La skeleta rakonto en ĉi tiu libro estas simpla sed streĉa detektivajeto, kiu certe plaĉas al infanoj. La ilustraĵoj estas tre bonaj, jam la du friponetuloj vizaĝoj sur la kovrilpaĝo promesas gajan legadon. Feliĉe, la libro plene plenumas tiun promeson. La vera studmaterialo, diversaj skribaj taskoj, estas en tre konvena tabula formo. Ili certe akcelas la lernadon.

Mi tra legis la libron nur unufoje, kaj trovis nur du preserarojn, povas esti, ke tie troviĝus kelkajn aliajn, sed gravaj ili ne povas esti. Pri la lingva enhavo mi volus diri nenion, sed unu punkto min vere iom ĝenis: la uzo de verbo **voli** kiel formanto de estonta tempo. Sur la paĝo 27 »Nun mi volas fini la leteron» kaj sur la 31a »Mi volas veni al la trajno per mia aŭtomobilo.» Ĉu la signifo de »voli» ne estas tre parenca al »deziri», indikante veran volon, emon, fari ion? En la lasta ekzemplo mi pli volonte dirus: »mi venos al la...» La uzo de »voli» certe estas ia

anglismo, aŭ naciismo ĝenerale, al kelkaj ĝermanaj lingvoj mankas alia rimedo formi futuron. Eble tamen estas plie demando de nur gusto, en tiu okazo mi mem ne uzus tian »voli»-kombinon.

La libro, TOM kaj TINA, estas entute tre rekomendinda por familioj, kiuj volas lernigi siajn infanojn en la elementoj de esperanto. En la lernejo, — nu tie estas la afero tiel, ke ni ne povas por finnaj lernejoj ĝin rekomendi, ĉar nia rekomendo ne multe valorus, estas la afero de Lerneja Administrejo (Kouluhallitus) difini kaj elkti lernolibrojn por lerneja uzo.

MOJCA ETULINO. Bildolibro por infanoj, ilustris Mara Kraljeva. Eldonis Mladinska Knjiga, Jugoslavio. Prezo 0.25 Usonaj dolaroj aŭ egalvaloro. Estas malgranda — 18 paĝa- bildolibro por infanoj. La rakonto temas pri malgranda knabino kiu loĝis kun kelkaj bestoj. La kunestado tamen abrupte finiĝas, kiam la bestoj komencas malami kaj persekuti unu la alian. Do estas tipa popoltema historieto. Fakte ĝi ankaŭ estas tia: Karintia popolrakonto, tradukita el slovena lingvo.

La lingvo estas simpla kaj klara, la rakonto estas tre mallonga, kaj sekve oni ne serĉas preserarojn. (Unu renversitan supersignon mi trovis, sed tia afero ja estas tute sensignifa!) En la libro de tiu ĉi speco la ilustraĵoj ludas la plej gravan rolon. Mara Kraljeva ŝajnas esti lerta fabelilustriisto. Ĝiaj bildoj estas belkoloraj kaj ankaŭ en nigra-blanka vesto tre klaraj kaj ĉarmaj. La ekstera aspekto de la libro estas alloga, kvankam ne je la sama kvalita nivelo kiel la respektivaj finnaj eldonaĵoj, kiel ekzemple la »Ora libraro» de Tammi. Mi dubas, ĉu ĝi sukcese rezistos la avidajn infanajn manojn, al kiuj ĝi tamen estas destinita.

Ĉar mi mem ne estas infano, mi ne estas ia spertulo koncerne tiaj aferoj. Mi do transdonos la libron al veraj specialistoj, ili en tre mallonga tempo raportos al mi kia la libro vere estas.

P. S. Nun la libro estas tra legita en nia infanĉambro. La rakonto, laŭdire estis bona, la bildoj bonaj ankaŭ. Kovriloj kaj la paĝoj jam nun, post tri horoj, estas disigitaj, afero prizorgita de unu kvarjara filino kaj du dujaraj filoj.

Ĉina antologio 1949—1959. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo 1959. 412 paĝoj. 23,5x16,5 cm. Prezo 500 mk (+ sendokosto 50 mk). Memdebla ĉe Joel Vilkki, Somero, pĝk. Tu 60 253.

La verko enhavas post la antaŭparolo 21 poemojn (39 p.) kaj 20 novelojn (335 p.). Je la fino ekzistas alfabeto listo pri la por ni eŭropanoj neklaraj vartoj; kaj interfoliite 13 tutpaĝaj, parte koloraj

reproduktoj pri la nuntempa ĉina arto. La bindaĵo estas bela, kun tola dorso; la popero en la libro tre bona kaj agrabla.

Kiel la nomo malkovras, temas nur pri la literaturo de la tempo de la Ĉina Popola Respubliko. En sia antaŭparolo Maŭ Dun, la prezidanto de la Ligo de Ĉinaj verkistoj, donas mallongan priskribon pri la nuna ĉina literaturo kaj promesas aldonajn volumojn al tiu ĉi unua volumo. Dank'al esperanto ni nun havas senkomparan okazon konatiĝi al tiu plej moderna ĉina literaturo.

Tiuj ĉi ĉinaj noveloj estas sendube tre agrabla legaĵo ankaŭ por ni okcidentanoj. Ilia lingvaĵo estas mirinde bona, tute laŭ-eŭropa, facile legebla: mi notis nur du-tri malfacile kompreneblajn lokojn. Preseraroj maloftas.

Laŭenhave ĉiu novelo estas interesa. Per ili ni en agrabla maniero konatiĝas al la nuntempa vivo en Ĉinio. Kelkaj noveloj priskribas militagojn, liberbatalon, sed eĉ tiuj rakontoj estas tre agrable prezentitaj. Sed speciale la noveloj pri la rekonstruado de la nova Ĉinio altiĝas ĝis tre alta morala nivelo, kio al ni rememorigas la kristan etikon. Kaj ĉio estas tiel streĉe — kaj ankaŭ arte — rakontita, ke oni legas la tutan kolekton kun granda entuziasmo. Ĝi estas tiel freŝa kaj interesa legaĵo, ke mi taksas la verkon unu el la plej valoraj el ĉiuj ĝis nun en esperanto aperintaj naciaj antologioj.

Ĉar ankaŭ la prezo estas nur la duono el tio, al kio ni kutimiĝis en tiaj verkoj, mi opinias, ke la libro trovos ankaŭ ĉe ni multajn dankemajn legontojn.

J. V — i.

Hugo Steiner, Sudtirolo en la jaro 1960. 63 paĝoj en A5. Prezo 6 respondkuponoj, ĉe Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I.

La broŝuro citas la dokumentojn, kiuj koncernas la politikan situon de Sudtirolo, en la celo pledi por la rajto de ties loĝantoj mem decidi, al kiu ŝtato ili apartenu.

Delfi Dalmau: Esperanta resumo de la stenologio kaj stenografio. 15 paĝoj en malgranda formato. Prezo 2 resp.kuponoj ĉe la aŭtoro, adr. Lauria 98, Barcelona.

Resumo de la studoj de la aŭtoro pri eblecoj fondi internacian stenografion. Ni ne estas kompetentaj juĝi la aferon de la vidpunkto de aliaj lingvoj, sed rigardante ĝin per finnaj okuloj ni nur konstatas, ke longe (aŭ duoble) parolataj vokaloj kaj konsonantoj ŝajnas ne esti priatentataj. Tiel ekzemple estus malfacile diferencigi inter la finnaj vortoj: muta, muuta, mutaa, mutta, muutta, muuttaa, kiu ja ĉiuj havas deferencan signifon. Verŝajne ni devas kanstati, ke rapida skribo estas aranĝebla nur por unu lingvo aŭ grupo de fonetike parencaj lingvoj sur la bazo de unu principaro.

KORESPONDEMULOJ

Iam kaj tiam ni ricevas petojn pri korespondaj anoncetoj. Jen malgranda listo pri tiaj personoj, kiuj volus kontakti kun finnaj esperantistoj.

F:ino Birgitta Hauptenthal

Paulstrasse 11a

Sulzbach — Saar Germanio

Estas 11-jara knabino, volus korespondi kun samaĝa knabino

F:ino Penka Kohtadinova

ul »79» N.o 7

PEŜTERA, Bulgario

Estas juna komerca studentino, volus korespondi kun juna viro.

S:ro Nastaj Janusz

Skr. Pocz. 379

LUBLIN 1, Pollando

25-jara poŝtmarkkolektanto — sekve li dezirus trovi filatelistan korespondanton.

S:ro Kazimierz Żuranski

Str. Ostrokecka 1

PRZEMYŚL Pollando

19-jara, interesita pri multaj aferoj: muziko, filmo, vojaĝoj, lingvoj, eĉ iagrade pri filatelio.

S:ro Magyari József

Salgótarján

OTp PF:90, Hungario

37-jara bankoficisto, korespondas pri io ajn, sed volus interŝanĝi komparajn notojn pri la parenceco de Hungara kaj Finna lingvoj.

S:ro Daniele Agostini

Via Guide 20

CORTINA (BL) Italio

12-jara itala knabo, volus trovi samaĝulon por korespondi kun li.

O. S. Aleksandrova

Domo de pioniroj,

Ul. Lenin 160

KIŜINEV, USSR

Temas pri praktikanto de nova aŭdio-sistema stenografio, ia parolŝpuro. Ŝi volus korespondi koncerne de tio.

S:ro Georgi Kostov

str. Vasil Zarkov, N.o 19

VRACA, Bulgario

S:ro Peter A. Todarov

str. Sredna gora N.o 88

SOFIA 3, Bulgario

La du lastemenciitaj estas junaj bulgaroj, ambaŭ 19-jaraj, kaj ili volus korespondi pri io ajn, »kun ĉiuj pri ĉio«, tiel ili mem skribis.

Esperanto en Radio

Radio-programoj pri la usonaj elektoj en Esperanto. La Voĉo de Ameriko decidis dissendi 30-minutajn radio-programojn pri la usonaj elektoj la 21-an kaj 28-an de oktobro, kaj la 4-an de novembro. La elektoj okazos la 8-an de novembro 1960. La radio-programoj enhavos informojn, intervjuojn kaj respondojn al demandoj riecevitaj el multaj landoj. Ĉiu programo estos disaŭdigata kvarfoje por atingi diversajn partojn de la mondo: unufoje por Orienta Azio, unufoje por Sudorienta Azio, unufoje por Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko, unufoje por Sudameriko. En ĉi tiu serio radiosendilo direktita al Sudameriko estos uzata unufoje por Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko. Oni uzos kvin sendstaciojn: unu en Okinaŭa (Rjukju-Insuloj), unu en Manila (Filipinaj Insuloj), du en Tanger (Maroko), unu en Orienta Usono. Detaloj estas en preparo. Informoj pri sendhoroj kaj ondlongij aperos poste. — La rezultoj de la antaŭaj radio-programoj de la Voĉo de Ameriko en Esperanto estis »kuraĝigaj» laŭ diro de ambasadoro George V. Allen, direktoro de la Usona Inform-Servo. Ĝis la 25-a de julio proksimume 950 leteroj el 65 landoj atingis la Voĉon de Ameriko pri la Esperanto-programoj. — Ricevraportoj kaj opiniesprimoj pri la enhavo estu adresataj al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Room 2528, HEW, Washington 25, D.C., Usono.

La programoj de la oktobraj elsendoj de Radio Roma kaj Zagreb ne alvenis ĝis la finredakto de tiu ĉi numero. Sed ili certe okazos kiel kutime.

»Boletin», organo de la Hispana Federacio Esperantista, rakontas, ke aktiva juna esperantisto Miguel Meseguer travivis interesan epizodon en vagonaro inter Benicarló kaj Barcelono.

En la sama vagono kunveturis du hispanaj sinjoroj, de komenco. Sed en stacio Vinaroz eniris tri junaj nederlandanoj. Ili, kompreneble, parolis nur inter si, nenion dirante al la hispanoj, kies lingvon ili ne komprenis.

Unu el la hispanaj sinjoroj eldiris tiam:

— Estas ja bedaŭrinda la neekzisto de lingvo komprenebla por la tuta mondo. Ĝuste nun ni troviĝas antaŭ tiuj eksterlandanoj, kiuj estas homoj similaj al ni, sed ne povas paroli kun ili, ĉar ili naskiĝis en alia lando.

Nia samideano ne povis silenti kaj ekdiris:

— Tamen, tiu lingvo ekzistas!

— Ah jes, Esperanto; sed kiu parolas ĝin? Por kio ĝi tagas? por nenio!

— Sinjoro, vi tute eraras. Ekzistas multaj esperantistoj en la mondo, kaj ili tre bone interkompreniĝis.

Aŭdinte la vorton 'Esperanto' unu el la nederlandanoj diris:

— Ĉu iu el vi estas esperantisto?

Samideano Meseguer respondis iom hezite:

— Jes... mi parolas iomete.

Granda ĝojo por la nederlandanoj!

Ni devas aldoni, ke sro Meseguer, malgraŭ sukcesa partopreno en kurso, ankoraŭ estis timema paroli, ĉar li ankoraŭ ne renkontis eksterlandanojn. Pro tio li komencis iom balbutante. Sed baldaŭ la interparolo fluis, je ambaŭflanka ĝojo. Kaj evidente la hispanaj sinjoroj konvinkiĝis rapide, ke Esperanto tamen taŭgas por io.

EL POPOLA CINIO

Esperanta revuo dumonata, aperanta en 36-paĝa kajero (19+26 cm.) riĉe ilustrita kun multkolora kovrilo.

informas vin pri:

La konstruado, popola vivo, kulturo, arto kaj literaturo, fundamentaj scioj, Esperanta movado de Ĉinio.

Tuj abonu ĉe la esperantista peranto.

Joel Vilkki SOMERO Poŝtiĝirokonto Tu 60 253.

Jarabono por 1961 mk 250:— Kiu pagos en oktobro ricevos la lastan ĉi-jaran numeron senpage. Petu specimenon (20:-)

